

SCIENCA REVUO	El Vol. 21
de Internacia	
Sciencia Asocio	n-ro 4/5(84,85)
Esperantista	5. 9. 1970
(BEOGRAD, Jugoslavio)	

PRI LA TRANSSKRIBO DE PROPRAJ NOMOJ, UNUAVICE EN LITERATURAJ TEKSTOJ

Mag. William Auld (Britio)

La transskribon de propraj nomoj en Esperanto oni ne povas rigardi kiel definitive solvitan. Ŝajnas, ke Zamenhof en la tre fruaj jaroj ne rekonis tion kiel problemon: li transliterigis sian nomon, kaj, en la unua eldono de »Hamleto«, tiun de Ŝekspir. Sed kiam la internacia lingvo komencis rapide disvastiĝi inter la okcidenteŭropaj popoloj, kiuj uzas latinan alfabeton, li cedis al ties kutimo lasi neŝanĝitaj la naciajn nomojn. Estas notinde, tamen, ke ĝis nun neniu estis tute konsekvenca pri la problemo. El la voĉoj, kiuj de tempo al tempo postulas raciigon de niaj kutimoj tiutemaj, la pli-multo estas sovetianoj, ĉar ili kompreneble, pro tio ke ilia nacilingvo ne uzas latinan alfabeton kaj estas ceterre pli-malpli fonetika, ĉiam kutimiĝis

al la por ili sola racia solvo: la rusigo de fremdaj nomoj. Okcidentanoj aliflanke, eble blindigite per la diversegaj manipuladoj de la sama trideko da literoj, plejofte malatentas aŭ ne rimarkas la fakton, ke ankaŭ inverse la problemo estas por ili solvita, nome per la elrusigo de rusaj nomoj.

Oni devas rekonii, ke pri tiu ĉi temo regas ne nur logiko kaj la praktiko, sed eble eĉ pli la emocio, kiun mi pritraktos sialoke. Sed eĉ se ni lasus flanke la nomojn de reale ekzistantaj esperantistoj (surbaze de tio, ke ili estas persona afero persone pritraktinda) kaj de la aktualaj kutimoj de niaj **parolkutimoj** (surbaze de tio, ke la kutimoj parolaj kaj skribaj ne ĉiam kongruas), restas tamen unu kampo sur kiu la ĥaoso estas nepre ordigenda,

surbaze de la koncepto, ke Esperanto estas lingvo **tutmonda** por faciligi la interkompreniĝon de senescepte ĉiuj homoj, kiuj tion nur aspiras: t. e. la presigo de nomoj en verkoj literaturaj. Ĝi estu do la ĉeffadeno de miaj ĉi-subaj argumentoj.

Asimilitaj propraj nomoj.

Ni konstata unue, ke efektive grandega nombro da nomoj estas jam **plene asimilitaj** en Esperanton: Sekspiro, Parizo, Cezaro, Sudameriko, Skotlando, Rabelezo, Bojolezo, ktp. Ili sidas perfekte en la lingvo, kaj estas deklinacieblaj. Eĉ tiuj, kies asimilita formo kutime ne havas finan -o, estas deklinacieblaj: zamenhofa teksto, kabeigi, labori sisife. Kelkaj estas asimilitaj en du formoj, kaj pri ili ankoraŭ ne estas findecidite: Heraklo aŭ Herkulo? Bulgarujo aŭ Bulgario? Venuso aŭ Venera? Tamen temas en tiaj kazoj pri konkurenco inter indiĝene asimilitaj formoj. Pri la nomoj jam asimilitaj ne ekzistas problemoj, kaj tial ili starigas jenan gravan demandon: se iuj multaj nomoj estas asimilitaj, kial Esperanto ne asimilu ĉiujn? Kompreneble faktoro de ofteco, vasta konateco kaj oportuneco ludas rolon.

Neasimilitaj propraj nomoj.

La transliterigo de propraj nomoj el kaj en la lingvojn, kiuj uzas malsamajn alfabetojn, estas necesa, kaj sekve ŝajnas tute natura al la koncernaj popoloj. Oni ĝin faras laŭ la fonetikaj konvencioj de la koncerna lingvo: **Ĉeĝoslovensko** fariĝas **Ĉeĝoslovakia** en la angla kaj **Tĉeĝoslovaĝuie** en la franca. Konfesinde tiu ekzemplo pravas, ke ankaŭ la naciaj lingvoj ne estas konsekvencaj, ĉar la kombinaĵo **cz** estas tute fremda al la angla lingvo! Kaj eĉ kiam oni transliterigas iun nomon, oni tendencas prononci la transliterigon laŭ la kutimoj de la propra nacia lingvo. Ekzemple, la hispana

Don Juan fariĝas en la itala **Don Giovanni**; en la angla ĝi restas **Don Juan**, sed oni kutime prononcas ĝin anglece, kiel tion pravas la rimoj uzitaj de Byron: **new one** kaj **true one**. La anglan nomon **Fagin**, kiun oni prononcas proksimume **Fejgin**, oni transiterigas en la rusan per la ekvivalentoj de **Fagin** kaj sekve prononcas ĝin laŭ la rusa kaj ne laŭ la angla maniero. La ĉefa kriterio de la naciaj lingvoj ŝajnas jena: ke la nomoj sidu nature en la koncerna lingvo.

Jam okazis en Esperanto multa transliterigo (sen asimiliĝo) de propraj nomoj el lingvoj ne uzantaj latinan alfabeton: Devjatnin (rusa), Maŭ Zedong (ĉina); Kohen-Cedek (hebrea); Nassif Isaac (araba); Stamatiadis (greka). Oni rajtas demandi: kial, konsiderante ke la sonvaloroj de la latinaj literoj diferencas en la diversaj lingvoj ilin uzantaj, la transliterigo pere de la esperanta alfabeto ne fariĝis ĝenerala kutimo? Kiel prave skribas TUPICIN:

»Unu el la plej geniaj avantaĝoj de Esperanto estas sendube ties principo: **nenia escepto al la gramatikaj reguloj kaj ĉion oni skribu laŭ la prononco**. Se ĝi tiel estus efektive, mi, uzanta Esperanton jam 52 jarojn, tute certe povus tralegi ĉiajn ajn esperantajn tekstojn tute libere. 52 jaroj plene sufiĉus por ellerni ian ajn alfabeton. Bedaŭrinde ili ne sufiĉas por ellerni la alfabeton de Esperanto! Nome, mi ne povas prononci multegajn proprajn nomojn, kiujn mi trovas en diversaj gazetoj, nomataj **esperantaj**. Ekzemple, kiel mi prononcu la nomojn: Shi Jong-wei, Qing biao, Xu sheng-yue, kiujn mi trovas en n-ro 5/1958 de gazeto 'El Popola Ĉinio', aŭ la nomojn: Jerzy Lec, Jarosinka Malek, Życie Warszawy, Grzedzielski, kiujn mi trovas en »Pollando« — ĵurnalo n-ro 11 de 1956, kaj multajn aliajn proprajn nomojn?» (G. Tupicin (Riga) en »Nuntempa Bulgario« 1959, n-ro 4, p. 43).

En la sama artikolo tiu aŭtoro rememorigas: »...metodon indikis al ni la plej granda esperantisto — Zamenhof: li estis hebreo kaj havis germanan familinomon, sed subskribis ĝin nek hebree, nek germanlingve (Samenhof), sed plene esperante: Zamenhof. Ĉu ni rifuzu tiun ĉi bonan ekzemplon de nia majstro?»

Malgraŭ ĉio, tre multaj latinliteruloj insistas uzadi nacilingvajn ortografiojn, verŝajne pro psiĥologiaj aŭ emociaj faktoroj. Ŝajnas, ke por multaj la propra nomo de iu persono tre ofte estas por tiu persono speco de tabuaĵo kiu, difektite, difektas la personecon. Krome, oni ne povas eviti la impreson, ke por iuj homoj la internacia lingvo estas iel malsupera, subuleca, al la denaska nacia lingvo.

Psiĥologiaj kaj emociaj faktoroj.

Unu el la plej klaraj esprimadoj de la supra sinteno estas trovebla en la studo de Manuel Halvelik (Belgio), »Normlingva Esperanto«. Li skribas (la substreko estas mia): »Ĉu ne ĉiu rektanima verdstelulo transportas en sia koro la devizon: 'Esperanto por internacia uzo, gepatra lingvo por nacia uzo'? Nu do, kiam ni vidas niajn proprajn nomojn torditaj en artifa korseto kaj je tio ankoraŭ etiketitaj per fremdaj sufiksoj — tiam ne restas multo de la genta kulturheredaĵo: **M o h a m e t o, K o l o m b o, B u d o,**

... **Nacia nomo, kiun oni esperantigas, similas al senhejma elmigrinto en stranga fremda homamaso, al misforma objekto sen sekso, sen koloro, sen animo, sen personeco, al sennoma aĵaĉo en brokantejo. Esperantigo de naciaj nomoj estas perforto kontraŭ la propran popolkarakteron ĉar pere de ĝi oni disprenas la nacian apartaĵon sub preteksto de necesa normigo kaj**

unupecigo. Ni subskribas la zamenhofan idealon per la du manoj, sed tio implicas ke ni ne ekzilu al rubsitelo la idiomon kiun ni estas lernintaj ek de la patrinaj genuoj, kiom ajn grave aŭ malgrave ĝi pezu sur la monda pesilo. Ni lernu el la malaprobinda ekzemplo de la eŭropa renesanca latinepoko, kiu malrekonebligis la nomojn de ĉiu ajn iom grava persono, farante **C a r t e s i u s** el franca Descartes, **C o p e r n i c u s** el polska (**tiel! W.A.**) Kopernik, **M e r c a t o r** el dica Kremer kaj eĉ aperigante latinan **C o n f u s i u s** (**tiel! W. A.**) en Ĉinujo! Nur tial ke oni opiniis tiam la gepatraj lingvoj bonaj (**tiel! W.A.**) sole! por kuiristinoj kaj popolaĉo'. Mondkulturon, akordite, sed tiam sur la ŝultroj de la unuopaj nacioj, ne sur iliaj dispremitaj korpoj! Sekve ni donu al la komunumo tion kio estas komuna, sed lasu al la individuo kio estas persona.«

Evidente tio estas ekstremisma esprimado. Ĝi baziĝas sur emociaj konsideroj kaj nacieca politika ideologio. Notu la sintenon al la lingvo Esperanto: »artifika korseto«, »fremdaj sufiksoj«, misforma«, »brokantejo«, »rubsitelo«, ktp. Tia opinio pri Esperanto (montriĝanta kvazaŭ senintence en flanka diskuto) devas, laŭ mia opinio, senvalidigi lian argumenton. Ne necesas substreki la mallogikon de la unuopaj argumenteroj (»ekzilu... la idiomon...« k. s.). Sed, mi petas, se mi kiel skoto legas la nomon **Szczybłicki**, kiom da sekso, koloro, animo aŭ personeco tiu nomo, havas por mi? Kiom da sekso, ktp, havas por neskonto la nomo **Lochwinnoch**? Ĉu ne koncernas nin kiel esperantistojn nur la lingvo Esperanto kaj ĝia sekso, koloro, animo kaj personeco?

Tamen konfesindas, ke ankaŭ multaj esperantistoj, kies lojaleco al la lingvo internacia estas senduba, influigas de emociaj kriterioj, kiujn — kvankam ili ŝajnas al mi eraraj — oni

ne povas tute malatenti. Unu tia amiko skribis al mi: »... eĉ en Francujo plej malsamkoloraj estas nomoj, kiel...: Dupont, Le Goff, Ybarlucea aŭ Reuter, respektive 'franca', bretona, baska kaj alzaca. Kaj, laŭ la ideoj de unu el miaj majstroj, Raymond Schwartz, se mi volas tipigi homojn el difinita regiono aŭ lando, gravas, ke mi skribas Marcel kaj Paul, kaj ne Marcelo kaj Paŭlo.« Nu jes; sed evidente tiaj nuancoj estas sentebraj **nur al samlingvanoj**, kiuj ja ne bezonas inter si Esperanton; kaj ili transiras **absolute neniom** al alilingvanoj, ĉu pere de Esperanto, ĉu pere de fremda nacilingvo. Sekve, laŭ tiu kriterio, neniel gravas, ĉu oni skribas en Esperanto Marcel aŭ Marcelo.

Tute hazarde, du el la amikoj, kun kiuj mi diskutis tiun ĉi problemon, havas la saman (skribitan) nomon: ili estas Roger BERNARD kaj BERNARD Cavanagh. Ili havas ankaŭ la saman sintenon. Roger skribis: »Mi naskiĝis BERNARD... mi ne naskiĝis BERNARDO (en Italujo' aŭ BERNHARDT (en Germanujo)«. D-ro Cavanagh diris al mi: »Mia nomo estas Bernard Cavanagh, ne Bernardo aŭ alia misformo«. (La fakto, ke li prononcis sian nomon (bō:d), dum mi, lia samlingvano, prononcas ĝin (bernerde) supozeble ŝajnas al li flankfero...). Nu, kio koncernas nin estas jeno: ke, kvankam tiuj du amikoj **ortografias** siajn nomojn tute same, ili **prononcas** ilin tute malsame; tamen tiun fundamentan fakton ne povas scii la kompatinda alilanda esperantisto, al kiu ambaŭ nomoj aspektas tute samaj. Se esti samaj, kial do ne esti same esperantaj? Tio ŝajnas al mi la vere malforta flanko de la emocia argumento.

Sono kaj signo.

Vorto estas rekonebla dumaniere: per ĝia sono, aŭ per la signo, kiu reprezentas tiun sonon. El ili, la sono estas historie la unua kaj ĉefa, ĉar oni parolis jarmilojn antaŭ ol oni ekskribis. Per la skribo oni indikas **pri kiuj sonoj temas**. Finfine, se la parolata lingvo ne ekzistus, se la prononco kaj elparolo ne necesus, tute ne gravus, kiamaniere oni indikus la vortojn skribe (ĉu per hieroglifoj, ideogramoj, literoj, aŭ alimaniere), kondiĉe ke oni la **koncepton** komunikus. En Esperanto la nacilingva formo estus tiel bona rekonilo, kiel la esperanta. Sed ĝuste ĉar temas pri flua prononcado, necesas raciigi la skribadon, por ke la homoj ne nur rekonu, sed ankaŭ elparolu la nomojn. Kaj ĉi tie ni konstata: **por la plimultaj nacianoj la fremlingvaj sonoj estas ofte neprononceblaj aŭ nerenkoneble fuŝprononcataj**.

Eblaj solvoj de la problemo pri propraj nomoj.

Rollet de Lisle proponis ortografii nacilingve, sed prononci kvazaŭ temus pri esperantaj vortoj. Kvankam oni povas facile primoki tiun proponon, elektante apartajn nomojn skotajn, anglajn, polajn aŭ hungarajn, oni devas agnoski, ke tio ne malofte okazas efektive en la praktiko. Honora Prezidanto de UEA estas s-ro Holmes. La plej sonproksima transliterigo de tiu nomo estus **heŭmz**, sed en la praktiko preskaŭ nur angloj alparolas lin tiel. Ordinare oni diras **holmes** aŭ **holms**. S-ro Wells iĝas **vels**. Ktp. Sed kiel **literatura** aŭ **ĝenerala** solvo tio ŝajnas neebla, pro la multaj »neprononceblaj« vortoj, kiuj rezultiĝus.

M opinias, ke tri solvoj estas eblaj laŭ la ĝisnunaj spertoj kaj kutimoj de la esperantistaro:

(1) Skribi la nomon laŭ la nacilingva ortografio; aldoni inter krampoj proksimuman elparolon laŭ la esperanta alfabeto. Ekzemple: David Copperfield (Dejvid Ko'pafild, aŭ: Kópa-fild.)

Tiun ĉi solvon aplikas »Nuntempa Bulgario«, vidu n-ron 7, 1970, p. 26:— »Ĉe la proksimuma fonetika transskribado ni uzos laŭeble nur esperantajn literojn; ni evitos uzi helpsignojn... ĉar ili prezentus plian malfacilaĵon, precipe por ne-latinliteraj landoj. Nature, por sciencaj lingvistikaj verkoj, kie estas necesa granda precizeco ĉe la transskribado, nia solvo ne taŭgas; sed »Nuntempa Bulgario« ja ne estas scienca eldonaĵo...«

Estas notinde, ke N. B. tamen devis aldoni jenan signifoplenan regulon: — »La literon **i** en la angla vorto **bird**, **i** en la bulgara vorto **Tirnov**, **u** en la angla vorto **but** ni plejofte signos per la helplitero **â**.«

(2) Skribi laŭ esperanta ortografio, aldoni inter krampoj la nacilingvan formon. Ekzemplo: Dejvid Kopafild (David Copperfield).

Tiun ĉi solvon konsekvence aplikadis dum jardekoj interalie Sennacieca Asocio Tutmonda.

(3) Plena esperantigo de la nomo, eventuale — nur kiam tio nepre necesas por rekono, kaj nur dum transira periodo ĝis plena asimiliĝo — kun aldono interkrampe de la nacilingva formo. Ekzemplo: Davido Kopafildo (David Copperfield).

Oni devas atenti, tamen, ke la tiel-nomata »rekono« estas tre unuflanka afero. Kvankam anglo pli facile rekonas kaj pli intime sentus la formojn **Maugham** kaj **Shaw** ol la formojn **Mom** kaj **Ŝo**, ĉe rusoj estas tute inverse, ĉar ili jam kutimiĝis al la formoj transliteritaj.

Oni rimarku krome, ke jam de la komenco en Esperanto la rusoj (kaj aliaj) estas devigitaj apliki rimedon 2 aŭ 3 por siaj nomoj, kaj ne trovis tion maloportuna.

Apartaj problemoj.

(a) **Kion fari pri la akcento?** En Esperanto la akcento falas ĉiam sur la antaŭlastan silabon; en la naciaj lingvoj ofte sur tute alian silabon. Efektive, la akcento estas ofte unu el la grandaj malfacilaĵoj dum lernado de fremda lingvo. Kiam la nacilingva akcento koincidas kun la esperanta, neniu problemo ekzistas; kiam ĝi ne koincidas, oni devas, almenaŭ por solvoj (1) kaj (2) indiki ĝin. Tion oni plejofte faras per supersigno (é) aŭ per apostrofo post la akcentenda silabo (e'). Grava malavantaĝo de la supersigno estas, ke multaj naciaj lingvoj jam utiligas ĝin, tiel ke konfuziĝo povas ekesti. Tamen por solvo (2) la supersigno eble taŭgas; por solvo (1) la apostrofo pli taŭgas; por solvo (3), kompreneble, la problemo estas jam solvita, ĉar oni prononcas la nomon laŭ la esperantaj reguloj.

(b) **Kion fari pri sonoj neekzistantaj en Esperanto?** Indikante la proksimuman elparolon de nacilingva nomo, oni ne povas per la esperanta alfabeto eĉ proksimume indiki multajn sonojn. La angla nomo **Wotherington**, ekzemple, enhavas minimume kvar sonojn nekonatajn en Esperanto. Fonetika alfabeto, kiu kovrus ĉiujn eblecojn, aŭ eĉ nur la plej oftajn, starigus grandajn malfacilaĵojn por la plimultaj esperantistoj, estus lernenda aparte de la esperanta alfabeto, kaj rezultigu nur tre proksimuma pro la jam rekonita fakto, ke multajn fremdajn sonojn oni ne povas bone prononci.

(c) **Kion fari pri literoj neekzistantaj en Esperanto?** Tiuj estas tre multaj: Q, W, X, Y, Φ , Ω , k. m. a. **Ĉu** niaj presistoj devas posedi ĉiujn literojn de la tuta mondo?

(d) **Kion fari pri nomoj, kiuj hazarde estas tradukeblaj laŭsignife?** Jam iuj individuaj esperantistoj tiel esperantigis siajn nomojn. Ekzemple, Will Green estas konata kiel Vilĉjo Verda. Ekzemple, Grenkamp-Kornfeld. Ĉu estus konsilinde traduki la anglan **White**, la germanan **Weiss**, la francan **Blanc**, la hungaran **Fehér**, ĉiujn per Blank(o)? Unuavide tio ŝajnas nekonsilinda, eĉ por literaturaj nomoj. Ĉu David Copperfield tradukiĝu per Davido Kuprokampo? Aliflanke, iuj literaturaj nomoj estas tiel elektitaj, ke ili aldonas farsan aŭ romantikan nuancon al la koncerna rolulo, ekz-e Sir Toby Belch — nomo de graso, gajanima, drinkema farsulo — oportune fariĝas en Esperanto Sir Tobi Rukt(o); simile la rabeza Grandgousier iĝu Grandfaŭkulo. Al mi ŝajnas, ke tiun ĉi problemon oni povas lasi al la bontrovo de individuaj esperantistoj aŭ tradukistoj, kiuj juĝu mem, kiam valoras traduki la nomon, kiam ne. Inter originalaj verkistoj. Schwartz kaj Forge jam brile kreis tiajn nomojn; kaj inter tradukistoj Kalocsay brilege sukcesis traduki la nomojn de la laboristaj komikuloj en »Somermoznoka sonĝo«.

(e) **Ĉu ĉiuokaze plene esperantigi la antaŭnomojn?** Treege multaj antaŭnomoj estas jam bone konataj en sia esperanta formo: Johano, Maria, Roberto, Francisko, Julio, Julia, ktp. La konsekvenca esperantigo de ĉiuj antaŭnomoj, laŭ la atestoj, ne renkontus multan opozicion.

(f) **Kreado de homonimoj.** Kelkfoje la esperantigita propra nomo rezultiĝas hominimo de jam ekzistanta ra-

diko, ekz-e: **Nietsche** — Niĉo/niĉo. Tio sentiĝas ankaŭ eĉ pluformado: **niĉa**. Tamen oni povas supozi, ke tio malofte kaŭzus konfuziĝon en aktualaj kuntekstoj; krome oni povas (kaj devus) zorge elekti la ĝustan esperantigon, ekz-e: **Niĉeo**; **niĉea**.

Iom inverse, oni forigus ideograman distingon inter nomoj samsonaj sed malsamortografiaj, ekz-e: **Régnier**, **Reigner**, **Rainier**. Sed ĉu tio fakte gravas en la kadro de internacia legantaro, por kies plimulto la ideograma distingo estas ĉiuokaze sensignifa (kaj — mi ne povas ne atentigi ankoraŭfoje — perdiĝas okaze de transliterigo en ekz-e la rusan)?

(g) **Deklinacio kaj pluformado.** Eble la plej decidiga faktoro en konsidero pri tiu ĉi problemo estas la eblico deklinaĉi aŭ pluformadi la nomon, kiel oni jam tion faras per la plene asimilitaj nomoj: ŝekspira tragedio, renkonti Cezaron, heraklajn taskojn. Nenio alia ol poltrona estas la »solvo« tre ofte aplikata, nome, oni skribas nomon nacilingve, poste deklinacias ĝin per aldono de 'on, aŭ, kiam la nomo finiĝas per vokalo, 'n, ekz-e **Copperfield'on**. Interalie tio ignoras la problemon de la akcento — ĉu la aldono de la finaĵo aliigas la akcenton, aŭ ĝi restas sur la sama loko? Eĉ persono, kiu scias prononci nacilingve la koncernen nomon, ne povas ne heziti antaŭ tiel deklinaĉita nomo. La nomo ne sidas elegante en la lingvo. Aliaj lingvoj havantaj deklinacion ne agas tiel poltrone: sed iliaj parolantoj, kompreneble, ne subtaksas sian idiomon vidalvide al aliaj lingvoj.

Malavantaĝoj kaj avantaĝoj de la solvoj.

Solvo (1) havas jenajn malavantaĝojn: fremdaj vortoj aspektas strangaj en la kadro de esperanta teksto; ilian

prononcado oni povas indiki ofte nur tre proksimume; deklinacio kaj pluformado estas maloportunaj.

Ĝia sola avantaĝo estas ideograma rekono de iuj relative malmultaj internacie konataj nomoj, far tiuj, kies nacilingvo ortografias latine.

Solvo (2) havas jenan malavantaĝon: transliterigo ofte rezultigas nomon tiel same strangaspektan en esperanta teksto, kiel estus nacilingva formo. Restas la problemo pri la deklinacio.

Solvo (3) havas jenajn avantaĝojn: la nomo sidas kvazaŭ indiĝene en la lingvo, ĉar ĝi ne aspektas fremda; ĝi estas plene deklinaciebla laŭ la reguloj de Esperanto; la akcenta problemo estas solvita.

Ĝiaj malavantaĝoj estas: kelkfoje okazas mislokigo de la akcento kompare kun la nacilingva formo (**Sháke-speare-Sekspiro**); kelkfoje ĝi ne estas tuj »rekonebla« laŭ nacilingva vidpunkto; al okcidentaj neesperantistoj ĝi povas aspekti stranga (!) — sed ne pli stranga, ol polaj nomoj aspektas al anglo... Oni povas ankoraŭ aldoni, se dezirite, la nacilingvan formon inter krampoj kiel ideograman rekonilon.

Estas notinde, ke tiu ĉi solvo havas du gravajn precedencojn: la jam asimilitaj nomoj, kaj la landnomoj.

Konkludoj.

Pro la menciitaj psikologiaj kaŭzoj estus senespere atendi en la nuna konjunkturo, ke ĉiuj esperantistoj tuj komencos esperantigi siajn nomojn. Nenio malhelpas, ke ili daŭrigu kiel ĝis

nun. Sed sur la paĝoj de la skribita literaturo ŝajnas jam tempo, ke la verkistoj apliku multe pli celkonscie ol ĝis nun la solvon n-ro 3: esperantigo de la nomoj. Tio estas, elekti tiun formon (fonetikan, etimologian, internacian, tradukitan), kiu sidas plej hejmece inter la ceteraj vortoj **esperantaj**. Ĝi havu esperantan akcenton kaj finiĝu per -o (vire) aŭ -a (-ine), ebligante senĝenan pluformadon. Mi konsilus eviti formojn, kiuj estas iel »fremdaj« al Esperanto, kiel ekzemple komencmajuskla Ŭ. La serioza kaj konsekvenca elprovado de tiu ĉi solvo sur la kampo **literatura**, kie oni evitas tiajn problemojn kiaj la mistifiko de la poŝta servo, ktp*, liveros atentindajn konstatojn pri la pli ĝenerala problemo — kiu ĝis hodiaŭ restas unu el la malfortaj flankoj de niaj lingvaj kutimoj.

Lasta vorto: se iu cinikulo demandas, kial mi subskribas mian artikolon per la nomo **William Auld** kaj ne per **Vilhelmo Oldo**, la respondo estas triflanka. Unue, ankoraŭ ne temas pri kunteksto literatura; due, la unua formo jam fariĝis konata ideogramo en **Esperantujo**; trie, mia longjara kutimo kontraŭpezas en mi, kiel en multaj aliaj. Sed se atentos mian alvokon sufiĉe multaj apogantoj, mi tre feliĉe ekuzos mian esperantan nomon.

* Tamen unu sagaca hinda amiko adresas siajn leterojn al mi en du lingvoj (angla kaj esperanta) paralele. Korekta sinteno! Sed bengaloj, hindoj, ktp. ja ne denaske kateniĝis al la latinaj alfabetoj!

Noto de la Redakcio

Konekse kun la traktata demando ne estus superflue prezenti ankaŭ la komprenon de Zamenhof pri la ortografio de la propraj nomoj, esprimita en 1904 responde al direktita al li demando. Lia respondo estis publikigita sisteme en la germana periodaĵo »Esperantistische Mitteilungen« de junio 1904, represita tiam en »Lingvo Internacia« de la sama jaro, pĝ. 216, poste enlokita en la »Lingvaj Respondoj«, eld. de Esperantista Centra Librejo, Parizo, III eld., 1927, pĝ. 35, kiu tekstas jene:

Propran nomon oni povas nun skribi tiel, kiel ĝi estas skribata en la ĝenerala lingvo de ĝia posedanto, ĉar en la nuna tempo la fonetika skribado de multaj nomoj kaŭzus tro grandan kriplajon de tiuj nomoj kaj diversajn malkomprenajojn. Sed tio ĉi estas nur rimedo provizora; ni devas celadi al tio, ek pli aŭ malpli frue en la lingvo internacia ĉiuj nomoj estu skribataj laŭ la fonetiko internacia de tiu ĉi lingvo, por ke ĉiuj nacioj povu legi ĝuste tiujn nomojn.

La aŭtoro W. Auld en privata letero skribas: »Mi opinias, ke 66 jaroj sufiĉas por provizora stadio!«.

Ciu scienca biblioteko devas posedi la libron

SCIENCAJ STUDIOJ

bazitaj sur originalaj esploroj kaj observoj
eldonita okaze de 50-jara jubileo de

INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA
sub redakto de
PAUL NEERGAARD

La libro enhavas 38 sciencajn artikolojn (alie gepublikigitajn), verkitaj de konataj sciencistoj el diversaj sciencaj branĉoj:

lingvistiko
historio
juro
muziko
poezio
astronomio
matematiko
geologio
mineralogio
kemio
tehnologio
zoologio
agronomio
medicino ktp.

240 grandformataj paĝoj, prezo 25 danaj kronoj (30 anglaj ŝilingoj) aŭ 50 steloj aŭ 3,50 dolaroj aŭ la egalvaloro

Mendebla ĉe la

Eldonejo **KOKO**, Edith Jensen, Vestergaardsvej 18 st tv, **KOPENHAGO**, 2400 NV, **Danlando**

pere de la librovendejoj, pere de la delegita reto de ISAE,

aŭ kun la aldonita bankĉeko ĉe la sekretario de ISAE al la adreso:
Prof. D-ro B. Popović, Ognjena Price 80, **BEOGRAD**, Jugoslavio.